
LA VERDA LUPEO



Informilo de ELF/AREK

Aprilo 2012 *(44a jaro)* *N-ro 159*

Esperanto Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcio: Rudolf Burmeister Max-Müller-Str. 86 DE 09123 CHEMNITZ

ESPERANTO SOCIETO
SENTA, 2012

Maska (Meksiko) poklon od Eržebet Sekelja



Maszk (Mexikó) Székely Erzsébet ajándéka

100
DATREVENO DE LA NASKIĜO DE



TIBOR
SEKELJ
(1912-1988)




Estimataj geamikoj

La stampobanko de nia ELF/AREK proponas al vi, inter alie, individuajn poŝtmarkojn laŭ temo Esperanto, neuzitaj:

Japanio	**eŭroj**
Pm kun talono - 53a KEK 2005 Kioto - 50 enoj	1,50
Pm kun talono - 53a KEK 2005 Kioto	1,50
a) pm pentraĵoj - 80 enoj	1,50
b) pm floroj – 80 enoj	1,50
Pm 2007 - 92a UK Yokohama - 80 enoj	2,00
Pm 2008 - 56a KEK Joyo - 50 enoj	2,00
Pm 2008 - 56a KEK Joyo - 80 enoj	2,00
Pm 2008 – JEK Wakajama – 50 enoj	2,00
Pm 2008 – JEK Wakajama – 80 enoj	2,00
Pm 2009 – 96a JEK Kohu – 50 enoj	2,00
Pm 2009 – 96a JEK Kohu – 80 enoj	2,00
Pm 2009 – Zamenhof 1859-1917 – 50 enoj	2,00
Pm 2009 – Zamenhof 1859-1917 – 80 enoj	2,00
Pm 2010 – 97a JEK Nagasaki – 50 enoj	2,00
Pm 2010 – 97a JEK Nagasaki – 80 enoj	2,00
Pm 2010 – 58a KEK Nara – 50 enoj	2,00
Pm 2010 – 58a KEK Nara – 80 enoj	2,00
Pm 2011 – 59a KEK Kobe – 50 enoj	2,00
Pm 2011 – 59a KEK Kobe – 80 enoj	2,00
Aŭstrio	
2005 – Terglobo kaj enskribo www.Esperanto	3,00
2006 – Monato Zeitschrift in Esperanto	3,00
2006 – Esperanto.net	3,00
2007 – Turmfalke – Turfalko	3,00
2008 – Terglobo, enskribo Esperanto.net	3,00
2010 – Ponto, enskribo Esperanto.net	3,00

Klarigoj:
JEK – Japana Esperanto-Kongreso
KEK – Kongreso de Esperantistoj en Kansajo
Se vi deziras ion akiri, kontaktu nian kluban amikon
Werner Heimlich, Fröbelstr. 4, DE 26914 Soltau





96a UK de Esperanto
2011 en Kopenhago
memglua
bruna, ru, ve k ni sur blanka

97-a UK de Esperanto
2012 en Hanojo
28x40 memglua
ru, ve sur blanka
Folio: 5x2





63a IFEF-kongreso
10 - 25 majo 2012
Herzberg a. H. (DE)
40x50, mg,
ni ru ve flava

64a IFEF-kongreso
7 – 14. 5. 2011
Liberec (CZ)
30x30. mg
multkolora

Dankon al Elda Doerfler pro la senditaj sciigoj.

Forgesita s-ano Richard Bartholdt sur E-poŝtmarko



Richard BARTHOLDT (naskiĝinta la 2-an de novembro 1855 en Schleiz, Germanio; mortinta la 19-an de marto 1932 en Sankta-Luizo, Usono) estis usona politikisto de la Respublikana Partio. De 1893 ĝis 1915 li estis membro de la Usona Domo de Reprezentantoj. Krome li estis prezidanto de la Internacia Parlamenta Unio.

Richard Bartholdt elmigris en 1872 de sia hejmurbo al Usono. Unue li loĝis en Broklino, kie li fariĝis presisto, verkis por gazetoj kaj laboris kiel eldonisto. En 1877 li transloĝiĝis al Sankta-Luizo; tie li laboris kiel gazeta raportisto kaj redaktisto. En 1893 li estis ĉefredaktisto de la gazeto *St. Louis Tribune.*

De 1895 ĝis 1897 li estris la komisionon pri enmigro kaj naturalizo, de 1897 ĝis 1905 la komisionon pri digoj kaj plibonigoj de la Misisipo, kaj de 1905 ĝis 1911 la komisionon pri publikaj konstruaĵoj kaj terenoj.

Rilato al Esperanto

En 1914 li proponis al la parlamento rezolucion favore al enkonduko de Esperanto kiel studobjekto en lernejoj en Vaŝingtono. Li klarigis:

> ***La tuta mondo scias, ke ni usonanoj malsufiĉe konas lingvojn. [...] Ĉiuj aliaj nacioj instruas du aŭ tri lingvojn en siaj lernejoj, sed ne ni. La internacia komerco absolute necesigas, ke al niaj junuloj estu instruata almenaŭ unu aŭ du lingvoj krom la gepatra. [...] Preskaŭ ĉiuj civilizitaj landoj akceptis Esperanton kiel helplingvo. Anstataŭ devigi la infanojn lerni la hispanan, la francan kaj la germanan, estus tre facile por ni instrui la Esperanton. Nur unu leciono semajne ebligus korespondadon kaj komunikadon per komuna lingvo kun ĉiuj aliaj landoj de la mondo. [...]***
>
> ***Ĉiu lando lernus sian lingvon kaj Esperanton: en Anglio la anglan kaj Esperanto kaj tiel plu. Tiel la internacia lingvo vere estus Esperanto. Mi ja iom studis lingvojn kaj komprenas, kiel handikapita sentas sin ekzemple viro, kiu, studinte la francan, vojaĝas al Parizo. Tuj kiam li ekparolas, ĉiuj rimarkos, ke li estas fremdulo, eĉ se li tre bone regas la francan. Franco parolanta kun li havus avantaĝon kompare al li. Sed se la franco devus lerni Esperanton, tiam ili estus sur la sama nivelo, kaj neniu el ili havus avantaĝon.***
>
> ***Mi legis en kelkaj Esperanto-gazetoj, ke ekzemple en Anglio grandaj fabrikoj nun presas siajn katalogojn kaj prezarojn en Esperanto, kaj ke aliaj komercaj presaĵoj en tiu lingvo estas dissendataj al la tuta mondo. Vi do vidas, ke tio venos. Kaj ĉar ni ĝis nun ne troplenigis la cerbojn de niaj infanoj per lingvoj, estus bona kaj utila ideo komenci per Esperanto. [...]***
>
> ***Ĝi estas tre facila lingvo. Mi lernis ĝin dum kvar lecionoj. Kompreneble mi ne havis la tempon por daŭrigi, kaj necesas praktiki. [...] Ĝin konsistigas vortoj el la angla, germana kaj latina lingvoj. Sed la tuta konstruo de la lingvo estas tiel rimarkinde simpla, ke oni demandas sin, kial oni ankoraŭ ne enkondukis tian universalan lingvon por la uzo de civilizitaj homoj...***

Fonto: Artikolo en Vikipedio de Weemeyer



P & Y (Saalfeld)



RBS (Jena)



WSR (Schleiz)

E-pm aperis antaŭ jam 3 jaroj en Germanio, neniu eksciis pri tio...

Dekoj da regionaj poŝtservoj ekzistas oficiale apud la Germana Poŝto, prizorgas poŝtan leter-trafikon kaj eldonas proprajn poŝtmarkojn.
En decembro 2011 J. R. Piton malkovris la ekziston de tiu poŝtmarko.
La kvarbloko estas dediĉita al „Famaj personoj de (urbeto) Schleiz“. La du subaj markoj en la bloko temas pri Richard Bartholdt. La maldekstra montras libron kun la protokolo de lia peticio por enkonduko de E en lernejoj kaj la vorton *Esperanto.*
La suba dekstra en la bloko prezentas portreton de Richard Bartholdt.
Pri li legu en apuda paĝo.
Aperigis ĝin komune en la jaro 2009 tri privataj poŝtservoj en la germana federacia lando Turingio:

- **WISENTA-Kurier en Schleiz (Kun mallongigo WSR en la marko)**
- **Postkutscher & Young en Saalfeld (kun P&Y en la marko)**
- **Reg. Briefservice en Jena (kun RBS en la marko)**

La nominalo de 45 cendoj valoras por afranko de letero en Germanio.
La markoj ne validas por afranki poŝtaĵon al eksterlando.

HEARINGS

BEFORE THE

COMMITTEE ON EDUCATION

HOUSE OF REPRESENTATIVES
SIXTY-THIRD CONGRESS
Second Session

ON

H. RES. 415
A RESOLUTION PROVIDING FOR THE STUDY OF ESPERANTO AS AN AUXILIARY LANGUAGE

STATEMENTS OF
HON. RICHARD BARTHOLDT
A Representative from the State of Missouri
AND
PROF. A. CHRISTEN

MARCH 17, 1914

WASHINGTON
GOVERNMENT PRINTING OFFICE
1914

COMMITTEE ON EDUCATION.

House of Representatives, Sixty-third Congress.


DUDLEY M. HUGHES, Georgia, *Chairman*.

WILLIAM W. RUCKER, Missouri.
ROBERT L. DOUGHTON, North Carolina.
JOHN W. ABERCROMBIE, Alabama.
J. THOMPSON BAKER, New Jersey.
JOHN R. CLANCY, New York.
THOMAS C. THACHER, Massachusetts.
STEPHEN A. HOXWORTH, Illinois.
JAMES F. BURKE, Pennsylvania.
CALEB POWERS, Kentucky.
HORACE M. TOWNER, Iowa.
EDMUND PLATT, New York.
ALLEN T. TREADWAY, Massachusetts.
SIMEON D. FESS, Ohio.
ARTHUR R. RUPLEY, Pennsylvania.

James L. Fort, *Clerk*.

House of Representatives,
Committee on Education,
Tuesday, March 17, 1914

La kompletan protokolon eblas legi en la interreta paĝaro: http://ia600306.us.archive.org/18/items/esperantohearing16432gut/16432-h/16432-h.htm



ESPERANTO

Langue
entre les peuples

Esperanto,
lingvo inter la popoloj

Individua poŝtmarko por enlanda letero ĝis 20 gr.
Eldonis: Franca Poŝto laŭ mendo de „Rodanalpa E-Federacio"
Eldonkvanto: 200 folioj (6x5) kun po 30 poŝtmarkoj
Aperis: 2010 Multkolora, mg
Desegno el proponoj de la E-grupo en Chambery.
Informoj senditaj de s-ino Mireille Besset, Francio al Elda Doerfler



http://rodanalpa.federacio.free.fr/articles.php?lng=fr&pg=395
http://www.forez-info.com/actualite/culture/14223-rodanalpa-esperanto-kongreso.html



NANTES ESPERANTO

Aperis: 2011
Multkolora. mg
Eldonkvanto: nekonata
Eldonis: nekonata
Bildo: Katedrala turo sur blua fono
Teksto: NANTES ESPERANTO
Nominalo: „Lettre prioritaire" (Enlanda letero)

Originalo mankas






1921 – 2011 Esperanta Societo Ljubljana, Slovenio

Individuaj poŝtmarkoj (Aperis: 2011)

Kategorio A:	**por enlanda leterafranko** **kun teksto en la slovena:** ***Esperantsko Društvo Ljubljana*** ***Kadro blanka***
Eldonkvanto:	**200 pecoj en 10 folioj**
Kategorio C:	**por leterafranko al eksterlando** **kun teksto en Esperanto:** ***Esperanta Societo Ljubljana*** ***Kadro verda***
Eldonkvanto:	**100 pecoj en 5 folioj**
Bildo:	**emblemo de la urbo Ljubljana: Drako**
Grafikisto:	**Sinjorino Suzana DUHOVNIK**
Prezoj:	**A) 0,75 € C) 0,90 €, plus afranko (ĉe Elda Doerfler)**
Informis:	**Elda Doerfler**



100a Datreveno de la naskiĝo de Tibor Sekelj (1912-1988)
Memorkoverto kaj poŝta stampo

La Filatelista Klubo Senta en kunlaboro kun la loka Esperanto-klubo aperigis omaĝe al Tibor Sekelj memorkoverton kaj iniciatis poŝtan memorstampon. Aperis ankaŭ memorkarto kun E-lingva surpresaĵo.



Mezuro: **32 mm**
Dato: **14. 02. 2012**
Poŝtejo: **24400 Senta, Serbio**
Bildo: **Portreto de Tibor Sekelj**
Teksto:
100-A DATREVENO DE LA NASKIĜO
DE TIBOR SEKELJ

Aperis ankaŭ mg glumarko (47x80 mm), videbla titolpaĝe. Eldonis ĝin la Esperanto-klubo Senta. La masko videbla en la marko troviĝas kun aliaj en la urba muzeo de Senta. Transdonis ĝin al la muzeo la vidvino de Sekelj. Ŝi vivas en la apuda Hungario.
La materialon sendis s-ro Imre Belec.
Tra la tuta mondo E-kluboj en februaro 2012 okazigis memorkunvenojn.








Sendita de Benedicto Silva

Samideano profesoro Benedicto Silva (nask. 1927) en São José do Rio Preto hobias i.a. filatelon kaj estas libro-amanto.
Aparte li kolektas la libron „La Eta Princo“ . El la pli ol 200 diverslingvaj eldonoj jam li posedas 158. De lia plumo aperis en 2011 artikolo pri *Esperanto kaj Filatelo* en la plurdekmil-ekzemplera revuo COFI de la Brazila Poŝto, rete videbla: http://issuu.com/revistacofi/docs/cofi221/1
En julio 2011 li mendis poŝtmarkon kun individua E-lingva talono. Videblas sur ĝi la princo kaj teksto „Mia Eta Princo“ kaj „Benedicto Silva - Delegito de UEA“. La marko valoras enlandan leter-afrankon.

Pri li legu ankaŭ: http://eo.wikipedia.org/wiki/Benedicto_Silva

2012: 100a datreveno de la morto de J. M. Schleyer, aŭtoro de Volapük









Schleyer Joh. Martin

Datuval väpüka „Volapük

Menade bal püki bal, nen däm plo motapük

Inventur linguae „universalis „Volapük "

Unam generi humano linguam sine periculo linguae vernaculae.

Volapuka bildkarto sendita 1899 el Amoy de P. Poletti („Yang Yen nung“)
(En la kolekto de nia kluba amiko J.R. Piton)

15.6.-9.9.2012
Ekspozicio
en Munkeno

„Esperanto – Volapük"

„ Inter utopio kaj realo: Konstruitaj lingvoj por la globalizita mondo"



Sub ĉi titolo Bavara Ŝtata Biblioteko en junio 2012 aranĝos ekspozicion kaj invitos al simpozio. Ĉi aranĝojn kompletigas akompana volumo kaj virtuala ekspozicio sur la ret-paĝoj de Bavara Ŝtata Biblioteko en Munkeno.
En 2012 okazos la 100a dat-reveno de la morto de prelato Johann Martin Schleyer, la aŭtoro de la plan-lingvo Volapük.
La pli sukcesa plan-lingvo Esperanto fariĝos 125-jara.
Per ĉi aranĝoj kaj publikigoj Bavara Ŝtata Biblioteko kontribuas al la aktuala diskuto pri lingua franca en la kunteksto de internacia scienca komunikado kaj donas impulsojn por la akcelado de interlingvistikaj esploroj.
Por la ekspozicio Bavara Ŝtata Biblioteko povas utiligi siajn valorajn stokojn pri la tem-kompleksoj interlingvistiko kaj plan-lingvoj kaj krome utiligi du grand-animajn donacojn:

- *La plimulton de la biblioteko kaj la tag-librojn de prelato Johann Martin Schleyer la filoj de D-ro Hanns Martin Schleyer transdonis al Bavara Ŝtata Biblioteko.*
- *Irmi kaj Reinhard Haupenthal transdonis al Bavara Ŝtata Biblioteko sian ampleksan plan-lingvan kolekton.*

Teksto el retpaĝo de la Bavara Biblioteko.

7. 3. 2012: La centa datreveno de la naskiĝo de Verda Majo

Japana esperantistino, kiu aktivis en la movado „Per E por Ĉina Liberigo“

78-A DATREVENO
DE LA NASKIĜO
DE **VERDA MAJO**

Verda Majo (Hasegawa Teru) estas fama japana esperantistino, internaciisma batalanto kaj granda amiko de la ĉina popolo. Ŝi naskiĝis la 7-an de marto 1912 en Saruhashi-vilaĝo (la hodiaŭa Saruhashi-urbeto de Ôtsuki-urbo) de Yamanashi-prefektujo de Japanio. La 19-an de aprilo 1937 ŝi venis al Ĉinio kaj multe kontribuis al la progresema afero de la homaro kaj la amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj. Ŝi forpasis la 10-an de januaro 1947 en Jiamusi-urbo de nordorienta Ĉinio pro malsano.

Por memorigi la 78-an datrevenon de la naskiĝo de Verda Majo, la Jiangmen-a Poŝta-Telekomunika Oficejo de Guangdong-provinco kaj Jiangmen-a Esperanto-Ligo kune speciale faris memorigan stampilon kaj emisias memorigan poŝtkarton kun Esperanto.





绿川英子诞辰78周年

绿川英子（原名长谷川照子）是日本著名世界语者、国际主义战士和中国人民的伟大朋友。她于1912年3月7日诞生在日本国山梨县猿桥村（今山梨县大月市猿桥町）。1937年4月19日她来到中国，对人类进步事业和中日人民友谊作了许多贡献。1947年1月10日她在中国东北的佳木斯市病逝。

为纪念绿川英子诞辰78周年，广东省江门市邮电局与江门市世界语协会特联合刻制纪念邮戳1枚和发行纪念明信片1枚。



片、戳设计：天夫（谢绍章）
发行：江门市邮电局、江门市世界语协会
Desegninto de poŝtkarto kaj stampilo: Tenf (Xie Shaoxing)
Eldonis: Jiangmen-a Poŝta-Telekomunika Oficejo kaj Jiangmen-a Esperanto-Ligo *1990-03-07*

Poŝta karto kaj stampo eldonita de PTO Jiangmen (1990-03-07)
memore al Verda Majo (長谷川 テル) Desegnis: Xie Shaoxing



A




B



C

A) 1990. 3.07 Changshu, Memorstampo por Verda Majo
B) 1993. 9.10 Pekino, Memorstampo pri la devizo „Per E por Ĉina Liberigo“
C) Glumarko (eld. 1923) kun la devizo „Per Esperanto por Ĉina Liberigo“



人造国际辅助语的前世今生（续九）

□家绳坦

„Jinling Filatela Forumo" 2011 nro 2 kun artikolo:

PASINTECO KAJ NUNO DE INTERNACIA HELPA LINGVO ARTEFARITA

de Song Shengtan

Nia kluba amiko Song Shengtan denove verkis ampleksan artikolon, la jam 9an daŭrigon, pri la Esperanta filatelo. Sur la paĝoj 22 – 27 li informas pri Esperantaj filatelaĵoj kun bildoj. Sur aparta paĝo sur „brilpapero“ videblas dekduo da Esperantaj poŝt-markoj en originalaj koloroj.

„Jinling“: estas la antikva nomo por Nankino



La titola paĝo

La Movado

Fondita en 1951 N-ro 728 oktobro 2011

ENHAVO

コペンハーゲンで第96回世界大会 …………	田熊健二	1
初心者道場(10) …………………………………	平山忠敬	2
楽しい作文教室（4）………………………………	塚本 猛	3
Kajero libervola：原発事故 ………	Hirotaka Masaaki	4
対訳：「列車」(1) ……………………………	太宰治／小西岳	5
新刊紹介：La Eta Princo ……………………	津田昌夫	6
わたしが出版を担当した本（1）……………	峰 芳隆	7

Komuna organo de Kansaja E-Ligo, Kjuŝua E-Ligo kaj Tyogoku/Sikoku E-Ligo

En la oktobra eldono de 2012, paĝo 15, troveblas informoj pri nia ELF/AREK el la plumo de nia estimata kluba amiko Haruja Maekaua

****



La revuo COFI, oficiala eldono de la Filatela Departamento de la Brazila Poŝto kun eldonkvanto de 25 mil ekzempleroj, en sia aprila numero de 2011 prezentis du-paĝan artikolon pri la Esperanta filatelo. Aŭtoro: S-ano Benedicto Silva. Li posedas ĉe la Brazila Poŝto tiom da reputacio, ke la artikolo eĉ estas surkovrile anoncita.
Informis: J.R.Piton

La artikolo videblas per la interreta <u>http://issuu.com/revistacofi/docs/cofi221/1</u>



Nia kluba amiko Ziro Suzuoki pretigis suplementon *Japanio* por la stampoparto de nia ELF-AREK-Katalogo

JP **JAPANIO**

25	Kobe-Gakuennisîmaĉi	1999 12-13 06	47a KEK*	32**	Ref.119-6***
26	Moĉizuki	1999 15-17 10	86a NK (Nagano)	31	120-3
27	Kumamoto Centra	2000 13-15 10	87a NK	31	123-5
28A	Takarazuka-Ekimae	2001 09-14 10	88a NK	32	127-4,7
B	Takarazuka-Minamiguĉi	2001 09-14 10	88a NK	32	127-4,7
29	Sakuranomija River City	2002 22-23 06	50a KEK(Osaka)	31	130-4
30A	Hukuŝima Centra	2002 01-06 10	89a NK	32x28	130-5
B	Iizaka	2002 01-06 10	89a NK	32x28	130-5
31	Suita Handainai	2003 31 05-01 06	51a KEK	32	133-11
32	Kameoka	2003 12-13 10	90a NK	32	134-7,10
33	Kusacu	2004 12-13 06	52a KEK	31	136-14,15
34	Inujama	2004 22-24 10	91a NK	32x28	138-5~7
35	Kioto-Ŝougoin	2005 03-05 06	53a KEK	31	139-19
36	Jokohama-Minato	2005 21-23 10	92a NK	30	140-1,141-5
37	Okajama-Kotobuki	2006 08-09 10	93a NK kaj 100 jaroj de E-movado en Japanio	32	143-4,144-15
38	Jokohama Centra	2007 04-10 08	92a UK	31	146-3,9~12
39	Ĵojo	2008 07-08 06	56a KEK	30	148-4
40	Ŭakajama	2008 11-13 10	95a NK	30	149-4,5
41	Kohu	2009 10-12 10	96a NK kaj la 150a datreveno de D-ro Zamenhof	31	152-18
42	Nara	2010 05-06 06	58a KEK	32	154-18
43	Nagasaki-Kita	2010 09-11 10	97a NK	32	155-18~20
44	Kobe	2011 18-19 06	59a KEK	31	157-12,13

---

* KEK estas mallongigo de "Kongreso de Esperantistoj en Kansajo".

** Koloro de stampoinko de 25 ĝis 44 estas ruĝbruna.

*** Referenco : N-ro kaj paĝo de LVL.



ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj


Prezidantino:
Elda Doerfler **>testudo.ts@gmail.com<**
Via Ghirlandaio 18/1 **IT-34138 TRIESTE**

Stampobanko:
Werner Heimlich
Fröbelstr. 4 **DE-29614 SOLTAU**

****

Kasisto: Rolf Beau **Eisser Kirchweg 18** **DE 27333 Schweringen**
Retpoŝta adreso: robo.espero@acn-mail.de
Konto: Rolf Beau **Commerzbank Hoya** **Banka kodo: 290 400 90**
Kontonumero: 420 933 400 **IBAN:DE 48 290400900420933400**
BIC-Code: COBADEFF297
UEA-konto: **ELF/AREK = Kodo: elfx/r**
Jarkotizo: € 17.00 Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 11.00

Prahistorion sur pm-oj , stampoj kaj poŝtkartoj serĉas interŝanĝe kontraŭ poŝtaj E-stampoj de Senta, Serbio
Sinjoro BELEC, Imre * St. Knicanina 9/A * 24400 SENTA, Serbio
Membro en la Esperantoklubo de urbeto SENTA



Afrankolibera pk por militkaptitoj
Eldonis: Itala Katedro de Esperanto – Sidejo Verona (1916?)